


SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

2007: 1



Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando
kaj
aliaj rakontoj

Italiensk novellsamling om norra Sverige

Esperanto är ett verktyg för kulturellt utbyte. Under 1950-talet arbetade italienaren Filippo Franceschi i en by utanför Umeå. 2006 kom hans minnen från de tiden ut som en novellsamling på Esperanto. Läs mer om den i Sten Johanssons recension på sidan 8.

Esperanto estas ili por kultura interŝanĝo. Dum la 1950-aj jaroj la italo Filippo Franceschi laboris en vilaĝo ekster Umeå. En 2006 liaj memoroj pri tiu tempo aperis en formo de novelaro en Esperanto. Legu pli pri ĝi en la recenzo de Sten Johansson sur paĝo 8.

Semajno de internacia amikeco 19-25 februaro 2007

"Ni ekbruligu la flamon de Amikeco trans limoj. Ĝia lumo signifas justecon, fratecon, pacon inter homoj kaj popoloj. Kaj por ke tiu flamo povu lumi pli klare en la mondo, ni laboras por la disvastigo de la neŭtrala internacia lingvo, Esperanto. En la servo de la nobla tuthomara kulturo ĝi vivu, floru kaj eligu la lumon de amikeco trans limoj."

Tiel Erik Carlén, antaŭ pli ol 36 jaroj anoncis la belan ideon pri la stariĝo de tiu ĉi grava jara evento, kiu poste fariĝis tutmonda tradicio de la Esperanto-medio. Al la origina ideo oni povas aldoni plurajn aliajn signifojn, laŭ propraj vidpunktoj kaj sugestoj de la medio, sed la ideo pleje respegulas la esencan fonon de nia lingvo internacia:

- egaleco inter homoj kaj nacioj;
- solidareco inter ĉiuj gentoj;
- respekto de homaj rajtoj.

Tamen, malgraŭ la dekomenca sukceso inter ni esperantistoj, iom post iom, tiu ĉi celebrado fariĝis pli modesta, malmulte ekspluatita, preskaŭ forgesita. Ĉu vere estas tiel? Donu vi respondon. La plej agema kaj vigla grupo estis ĝis nun sendube tiu de Loveno (Leuven) en Belgio, kiu ĉiujare organizas imponan aranĝon kun subteno de la urba administracio. Petu sugestojn kaj informojn al tiuj esperantistoj, ili estos kontentaj helpi vin.

Alia grupo kiu ĉiam organizas ion elstaran estas tiu de Triesto (Italio), kiu ĉi-jare dum tiu semajno prezentos "Kurta KinoEsperanto Festivalo"-n kaj la filmojn alvenintajn el Italio, Ukrainio, Litovio, Kroatio; ĵurio kaj publiko voĉdonos por la plej bonaj.

Kongress i Lesjöfors

Svenska Esperantokongressen äger i år rum på Esperanto-Gården, den svenska esperantorörelsens eget vandrarhem i Lesjöfors i Värmland. Läs mer på sidan 3.


La Sveda Esperantokongreso ĉi-jare okazos en Esperanto-Domo, la propra gastejo de la sveda Esperantomovado en Lesjöfors en Värmland. Legu pli sur paĝo 3.




Årets esperantist

Svensken Bertil Wennergren fick i år titeln "Årets esperantist" efter en omröstning i den ryska tidskriften Ondo de Esperanto. Han är medlem i Akademio de Esperanto och har författat Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko. Läs mer på sidan 6.

Esperanta teksto sur paĝo. 6.



Daŭrigo sur paĝo 4.



LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Monato 2007 • 95-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm

Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: esperanto@globalnet.net

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2007: 200 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00

E-post: sef@esperanto.se

Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2007:

Direktansluten medlem 200 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*. Tilläggs exemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Masthuggsliden 1, 413 18 GÖTEBORG
Postgiro: 578-5 **Nätsida:** www.algonet.se/~eldona/
E-post: eldona@telia.com **Telefon:** 031 - 12 05 94.

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,
Nätsida: www.e-g.se **E-post:** egarden@esperanto.se
Telefon: 0590-309 09

Manus till *La Espero*

sänds till Leif Nordenstorm, Järnvägsgränd 11
961 76 Boden, tel. 0921-123 54
e-post: esperanto@globalnet.net

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5	30 september	31 oktober
Nr 6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

NI PREZENTAS

Johan Krig Ölund

Kie vi naskiĝis?
En Boden.

Kie vi loĝas?
En Boden.

Pri kio vi laboras/studas?

Mi studis internacian materialteknikon ĉe Luleå teknika universitato dum semestro, sed ĉesos nun. Restas nur subskribi la paperojn. Estis tedege kaj laborozege kaj mi bezonas paŭzon el la studado.

Kiujn interesojn vi havas krom Esperanto?

Ludi klasikan gitaron, lingvoj, programi, neĝskoteri, slalomi, bicikli, kolekti kolekti monerojn, "slot-racing" ktp.

Ĉu vi havas familion?

Frateton 16, fratineton 10, kaj miajn gepatrojn kaj ni ĉiuj loĝas kune.

De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?

La someron 2004 mi kredas. Estis inter la unua kaj la dua klaso de la gimnazio, kaj havante malmultege por fari mi ekserĉis informon pri ĝi, nur aŭdetinte iom pri ĝi en la klasoj 7-9 (högstadiet), kaj tuj interesiĝis!

Ĉu vi havis aŭ havas iujn taskojn en la Esperanto-movado?

Mi estas lingvohelpanto ĉe Lernu! kaj



foje tradukas. Mi ankaŭ estas sekretario de SEJU.

Kiu estas via preferata libro en Esperanto?

Mi ne legis multajn, sed bona estas "Vizito sur la teron".

Ĉu ekzistas aliaj interesaj pri vi?

Mi krom Esperanton kaj la svedan konas 11 aliajn lingvojn almenaŭ lege kaj skribe. Mi biciklis 17 km sur la postrado kun biciklo havita ekde kiam mi havis 6-7 jarojn.

Intervjuis: Leif Nordenstorm

Estimataj samideanoj!

Mi sidas en mia kelo en marda antaŭtagmezo verkante la lastajn liniojn en tiu ĉi numero de *La Espero*. Ĉar mi estas pastro mi havas du liberajn tagojn en la semajno mem kaj laboras preskaŭ ĉiun semajnfinojn. Estas malvarma tago. Mi termomebro montras -27 C. Tio estas ĝis nun la plej malvarma tago dum tiu ĉi vintro, sed mi ne plendas. Mi ja aŭskultis la diskutojn pri la varmigado de la mondo. Kiam mi estis infano oni timis novan glaciepokon. Nun oni timas la malon. Ne estas facile scii kion oni kredu. Mi tamen ĝojas pri la malvarmo.

Mi ĵus aŭdis pri raporto pri tio ke svedaj gejunuloj, kiuj legas multajn librojn en la angla lingvo multe perdas pri la kompreno. Oni kredas ke oni scias la anglan, sed oni tamen ne sufiĉe bone scias por vere kompreni la nuancojn. Oni rekomendas ke oni vere uzu svedajn lernolibrojn, kiam ekzistas.

Kiam oni disdonis la Nobel-premiojn kelkaj svedaj sciencistoj plendis en debata artikolo. Oni diris ke la svedaj universitatoj ne estas sufiĉe bonaj, ĉar malmultaj svedoj kaj multaj usonanoj ricevas Nobel-premiojn.

Strange ke ili ne komprenas ke la angla lingvo donas avantaĝon en tiu ĉi lingva sistemo. Tial mi daŭre laboros por Esperanto, kiu estas la plej justa solvo de la monda lingva problemo. Esperanto - ĉies dua lingvo!

Via redaktoro

Invito al Esperanto-Domo en Lesjöfors

KALLELSE TILL ÅRSSTÄMMA

Förlagsföreningen Esperanto upa söndag 20 maj 2007 kl 10:30 på Esperanto-Gården i Lesjöfors. Sedvanliga årsmötesförhandlingar.

Inte medlem? Det kan man bli för en tia, men varför inte betala in några tior så får du en andel per tia, till plusgiro 578-5 nu.

Ĉi-jare la SEF-jarkongreso okazos en Esperanto-Gården, Lesjöfors. Ni invitis Flory Witdoeck de Oostende, kiu prelegos pri "Esperanto en Europon".

Tuj antaŭ la jarkongreso estos eblecoj partopreni en la internaciaj ekzamenoj laŭ ILEI/UEA. La ekzamenoj okazos de ĵaude antaŭ-tagmeze ĝis vendrede posttagmeze. Pri la ekzamenoj legu sube. Vendrede vespere Mireille Grosjean kaj Agneta Emanuelsson informos pri la laboro adaptigi la Esperanto-ekzamenojn al la niveloj rekomendataj de la Eŭropa Konsilo.

Por tiuj kiuj interesiĝas pri aranĝo de ekspozicioj aŭ volas plibonigi la informon al la presaro, ni ankaŭ aranĝos du paralelajn seminariojn/laborprogramojn pri tiuj temoj. Ili okazos vendrede post la tagmanĝo, do antaŭ kaj ekster la jarkongresa programo. Notu sur via aliĝilo ĉu vi volas partopreni en iu de tiuj seminarioj aŭ informu Kaisa Hansen.

Eblas veni pli frue kaj ĝui la liberatempon kaj la naturon ĉirkaŭ Lesjöfors. Se vi venas ekster la SEF-jarkongresa programo, ne forgesu mendi kromajn manĝaĵojn.

Venu kaj ĝuu la internacian etoson.

Provizora programo de la SEF-jarkongreso 18-20 de majo

Vendredo 18 de majo

15:30 Bonvena kafo
17:00 Kongresejo malfermiĝas
18:30 Vespermanĝo kun interkona vespero

Sabato 19 de majo

8:00 Matenmanĝo
10:00 Solena malfermo kun salutoj
10:30 Prelego
12:00 Tagmanĝo
13:00 SEF jarkunveno
16:00 Prelego
17:00 Jarkunsido KELI (sveda sekcio)
17:00 Jarkunsido ILEI-SE
18:30 Rondo Langlet
19:00 Supeo

Dimanĉo 20 de majo

7:30 Matenmanĝo
8:30 Ekskurso (se eblas ni vizitos Råmen preĝejo kaj lernos pri ĝia renovado. Je la fino de nia vizito, ni havos mallongan pritrakton)
10:30 Jarkunsidoj de Eldona Societo

kaj SEJU
12:00 Interparolo kun preleganto
12:45 Fermo kaj poste ĝisrevida tagmanĝo

Antaŭ- kaj posttagmezaj kafpaŭzoj okazos.

Aliĝu prefere antaŭ la 15 de marto por ĝui la malaltan kotizon. La aliĝo validas nur post plena pago. Post la 22-a de aprilo Esperantogården ne plu garantias lokon. Do aliĝu frue!

Kongreskotizoj

Aliĝkotizo
Plej laste la 15 de marto 200:-
Ekde 16 de marto 300:-
Gejunuloj ĝis inkl 24 jaroj 100:-
Ekzamena kotizo 320:-
(por tiuj kiuj volas ekzameniĝi)

Ĉambraj prezoj inkl litotukoj
Plurlita ĉambro 225:-
2-lita ĉambro* 300:-
1-lita ĉambro* 350:-
* laŭ ebleco en Esperanto-Gården, eble aliloke en Lesjöfors

Propra necesejo en la ĉambro kostas 40:- po persono kaj nokto.

Kongresaj manĝoj entute 600:-
(inkl maten-, tag-, vespermanĝoj, sabata supeo, antaŭ- kaj posttagmezaj kafoj, manĝoj ekde alvena kafo vendrede posttagmeze ĝis dimanĉa tagmanĝo)

Kromaj manĝoj
Matenmanĝo 50:-
Kafo aŭ teo kun kuketo 20:-
Lunĉo 75:-
Vespermanĝo 75:-
Sabata supeo 195:-

Notu ĉu vi volas manĝi vegetare aŭ ĉu vi havas alian deziron!

Pagu al la SEF plusgiro: 2012-3.

Notu nomon, adreson, retpoŝtan adreson kaj telefonnumeron. Bonvolu ankaŭ noti kiam vi alvenos. Ankaŭ notu ĉu vi volas partopreni en iu el la seminarioj. (Gvidos ilin Kaisa Hansen kaj Bengt Nordlöf).

Nepre mendu ankaŭ kromajn manĝojn ĉu vi volas manĝi ekster la kongresa programo dum ĵaudo kaj vendredo.

Medlemmarna i Svenska Esperantoförbundet kallas härmed till årsmöte som äger rum den 19 maj kl 13:00 på Esperanto-Gården i Lesjöfors. Motioner till årsmötet ska vara inkomna till styrelsen senast den 18 mars.

Styrelsen

Ekzamenoj okazos!

Kaj en Japanio kaj en Esperanto-Gården okazos internaciaj ekzamenoj ĉi tiun jaron!

Finfine troviĝas ebleco trapasi la internaciajn ekzamenojn de UEA/ILEI en Svedio (vidu :www.uea.org/aga-do/instruado/)

SEF kaj ILEI-se kunlaboras pri la aranĝo. Tri ekzaminantoj deĵoros: Mireille Grosjean, komitanano de IEK (Internacia Ekzamena Komisiono), Agneta Emanuelsson kaj Roland Lindblom.

La ekzamenado komenciĝas je la 10:a ĵaude, la 17:an de majo per antaŭtesto. Post la lunĉo okazos la skriba parto dum tri horoj. Vendrede estos la parola parto. Se oni malsukcesas en unu parto oni ne rajtas pluri.

La kotizon por partoprenado, 320 kronojn, vi pagu al SEF plusgiro: 2012-3.

IEK laboras por adaptigi la esperantajn ekzamenojn al la referencniveloj:

(A1 – C2), de la naciaj eŭropaj lingvoj, aprobitaj de la Konsilio de Eŭropo.

Troviĝas du niveloj: la elementa (ĉirkaŭ B1) kaj la meza, sed ankoraŭ ne la supera. 3–15 personoj povas trapasi kaj la elementan kaj la mezan ekzamenojn.

Ni anoncos ankaŭ en niaj najbaraj landoj. Do ne prokrastu la decidon! "Kuraĝo ĉion atingas", diras la proverbo. Ne hezitu! Esperanto-Gården ne situas en Japanio! Ekzamenpreparaj seminarioj en Stokholmo (Kaisa Hansen, 08-590 88 210) kaj en Gottenburgo (Siv Burell) kaj espereble ankaŭ aliloke!

Informo kaj aliĝo al la ekzamenoj: 0302-411 40 siv.burell@telia.com

Ebbe Vilborg premiita

La Sveda Akademio, kiu decidas ankaŭ pri la literatura Nobel-premio, la 20-an de decembro diskonigis, ke ĝi premias la konatan esperantiston Ebbe Vilborg per speciala premio de 50.000 svedaj kronoj (iom pli ol 5.000 eŭroj). En la motivigo de la premio estas aparte menciita lia laboro por Esperanto, sed ankaŭ liaj verkoj kun rilato al latino kaj la klasika greka lingvo. En la sama kunsido reprezentantoj de la Sveda Akademio akcentis la neceson defendi la svedan lingvon kontraŭ la angla.

Ebbe Vilborg, kiu ĉi-jare povis soleni sian 80-an naskiĝtagon, dum multaj jaroj estis docento pri la klasika greka lingvo en la universitato de Gotenburgo. Li estas honora membro de UEA.

Jam en 1958 aperis lia malgranda dudirekta vortaro esperanta-sveda-esperanta, kaj en 1992 estis eldonita lia vortaro sveda-esperanta, la plej granda ĝis nun aperinta leksikono inter la sveda kaj Esperanto. La gazeta komuniko de la Sveda Akademio aparte mencias, ke Ebbe Vilborg pli frue estis ano de la Akademio de Esperanto.

La specialaj premioj de la Sveda Akademio al Ebbe Vilborg kaj al pluraj aliaj personoj estis anoncigitaj en solena kunsido de la akademio la 20-an de decembro. La kunsidon ĉeestis interalie la gereĝoj de Svedio. Dum ĝi la direktoro de la Sveda Akademio, Sture Allén, faris paroladon en kiu li akcentis la neceson defendi la svedan lingvon kontraŭ la angla.

Pri la sama temo parolis poste ankaŭ la konstanta sekretario de la Sveda Akademio, Horace Engdahl. Parolante pri la uzo de la angla lingvo en universitata edukado, li diris interalie:

Estas bizare, ke iu povas opinii, ke transiro al lingvo, kiun instruistoj kaj studentoj ne plene regas, povus konduki al kvalitaltiĝo en la scienca diskuto. Kiel svedo en la angla oni iĝas pli stulta, kaj la unua konsekvenco ŝajnas esti, ke oni tion ne rimarkas.

www.liberafolio.org

Lingva festivalo en Västerås

Sabaton la 14-an de oktobro estis aranĝita duontaga lingva festivalo en la biblioteko de Västerås.

Ĉefa motoro estis Wim Posthuma kiu kun helpo de plejparte eksterlanddevenaj esperantistoj el preskaŭ la tuta lando sukcesis bonege prezenti grandan nombron da lingvoj el multaj diversaj mondopartoj.

El Norrköping venis kvar personoj, nome: Alf Wernersson, kiu ŝoforis, Shiromi kaj Wilhelm Ternborg kaj Haldo Vedin. El tiuj Shiromi sendube estis la plej grava persono, ĉar ŝi estis "lingva ambasadoro" por la singala lingvo, tasko kiun ŝi brile plenumis.

Sur komputera ekrano kontinue estis montrataj informoj pri ŝia hejmlando Sri Lanko kaj sur table ŝi prezentis manlaboraĵojn kaj kuketojn de tie. Sur tabulo troviĝis la singala alfabeto kaj aliaj informoj pri la lingvo, kiu cetere estas iom parenca al la sveda, ĉar ambaŭ estas indoiranaj lingvoj laŭ moderna terminaro. Kun helpo de Wilhelm ŝi ankaŭ respondis al demandoj pri la lingvo kaj sia hejmlando.

Dum la tago ankaŭ okazis diversaj distraĵoj. Tri malsamaĝaj grupoj el Bolivio prezentis muzik - kajdancprogramojn kaj grupo da pensiuloj el Västerås dancis *square*-dancojn el Usono. La por ni bone konataj Jomart kaj Nataša kantis kaj ludis kaj kvaropo da junaj virinoj el Kazahio dancis.

La lingvisto Tuomo Grundström interese prelegis pri diferencoj inter finn-ugraj kaj nordgermanaj lingvoj. Estis tre interese viziti la tablojn de la Ĉirkaŭ dudek lingvoj reprezentitaj. Mi persone kun granda ĝojo povis konstati ke la "lingva ambasadoro" por la latva estis Margarita Zelve el Riga kiu bone konas miajn (kaj niajn) malnovajn amikojn Saulcerite Neilande, Aristids Medies, Alida Zigmunde kaj Zigfrids Polaks.

Kiel konstatis la estro de ABF en Västerås dum la malfermo tia lingva festivalo signifas multon por krei intereson pri aliaj lingvoj kaj kulturoj. Wim Posthuma havos grandan honoron el la bona aranĝo.

Haldo Vedin

Kontakto kun Ĉikago

La Esperantoklubo de Ĉikago volas havi kontakton kun Esperanto-Societo de Gotenburgo ĉar la urboj estas t.n. partneraj urboj. S-ino Ragnhild Berglund en Björketorp, kiu iam loĝis en Ĉikago, tenos la kontakton inter nia kaj la ĉikaga kluboj kaj ŝi raportos al ni pri la evoluado. La ĉikaga klubo havas sian hejmapagon ĉe www.esperanto-chicago.org

Inter-Ligilo



La Esperanto-klubo de Ĉikago

Semajno de internacia amikeco. Daŭrigo de la kovrilo.

Spektontoj, ankaŭ ne esperantistoj, estos bonvenaj.

Pluraj Esperanto-grupoj aranĝas komunan vespermanĝon aŭ skribas bildkartojn al malproksimaj geamikoj, aliaj organizas ekskurseton, aliaj donacas librojn al fora E-grupo. La eblecoj ion fari estas abundaj, sufiĉas iom da bona volo. Bona, eĉ bonega, ideo estus kolekti monon por financi la partoprenon de junulo al TEJO-Kongreso en Vjetnamio aŭ al UK en Japanio.

Mi invitas vin ĉiujn partopreni en tiu ĉi celebrado: bonvolu kontakti min – se vi emas – por peti informojn, sugestojn, indikojn; mi estas je dispono. Kaj, se vi ion aranĝos, bonvolu informi min kaj mi informos la aliajn, kiuj povos imiti vin kaj ricevi instigon al simila agado.

Edvige Ackermann (Italio)
Komisiito de UEA pri ISA

Det händer på Esperanto-Gården 2007



Sportlovsöppet

Fira sportlovet i Värmland med gröna skogar och gnistrande snö! Lämna storstadens rask och slask, strunta i högsta fjällen med högsta priserna, njut i stället av solen i vintriga bergslagsskogar. Esperanto-Gården i Lesjöfors bjuder in dig som vill prova på vintersport i familjeformat. Vi är igång alla tre sportlovsveckorna. Vi har både spår och backar. Vi kan dessutom erbjuda skridskosjöar samt vår nya Vår vinter Special: tävlan i snöskulptering. (Fast vi kan naturligtvis inte lova någonting när det gäller väder, snö och isar).

Skidlift 90 meter hög ligger 2 kilometer åt sydväst. Liftkort för halv dag (kväll) och heldag säljs i backen. Samåkning till skidbacken varje dag kl. 9 från Esperanto-Gårdens parkering. Elljusspåret är 4 km långt och passerar Esperanto-Gården på nära håll. Spolad skridskobana (bandyplan) ligger 100 meter från gården.

Nyfiken på Esperanto ger dig, som knappt hört talas om esperanto, en inblick i språkets idé, historia och användningsmöjligheter och ett smakprov på hur det låter. Fördjupningen visar dig esperantos ordbildning, meningsbyggnad och början till ett praktiskt ordförråd.

För 1.400 kr per vuxen och 900 kr per barn under 13 år får du säng på vårt vandrarhem i fem nätter, kvällsmat, frukost och enkel matsäck till backen, skogen eller sjön. Barn under 3 år gratis. Vill ni ha ett rum för er själva med egen WC så kostar det 250 kr till. Bara sängen och kök för självhushåll kostar 600 kr per vuxen och 375 kr per barn under 13 år.

Veteranträff

Esperanto-Gården i Lesjöfors bjuder in esperantorörelsens veteraner till en vecka att återuppliva gamla minnen i vänners glada lag. Syftet är att dokumentera en viktig del av vår moderna historia, Sveriges mest internationella folkrörelse och en världsomspännande idealistisk kraft för fred, frihet och mänsklig värdighet.

Vi möts i Lesjöfors lördagen den 3 mars 2007 och avslutar träffen följande lördag. Vi samordnar våra resor och samåker så gott det går. Om du har svårt att ta dig ända fram, så ordnar vi skjuts sista biten.

Du bor på Esperanto-Gården i sju nätter i flerbäddsrum med egen WC samt helpension (tre måltider om dagen) för 1.960 svenska kronor.

Sommarkurser i esperanto

24-30 juni. Mer information kommer senare i La Espero. På hemsidan www.e-g.se finns den redan utlagd.

Välkommen!
Esperanto-Gården
680 96 Lesjöfors
Telefon 0590-309 09
Hemsida: www.e-g.se Här finns mer information.

FABELO

Guto da Akvo

La fabeloj de la dana verkisto H.C. Andersen estas famaj en multaj landoj, kaj tradukiĝis al multaj linvoj, ankaŭ al Esperanto. En nian lingvon ilin tradukis la aŭtoro de la lingvo, Lazaro Ludoviko Zamenhof. Pro tio la fabeloj fariĝis ne nur dana, sed ankaŭ Esperanta klasikaĵo. La lingvaĵo de tiu ĉi kaj de aliaj frauj tradukoj en Esperanton fariĝis modelo por bona lingvouzo. Do, ĝuu unu el la fabeloj de Andersen.

Vi certe ja konas grandigan vitron, rondan vitron, kiu ĉion faras centoble pli granda ol ĝi estas en efektiveco? Se oni ĝin prenas kaj tenas antaŭ la okulo kaj rigardas tra ĝi akvoguton el la laĝeto, tiam oni vidas pli ol milon da strangaj bestetoj, kiujn oni ordinare neniam vidas en la akvo, sed kiuj vere kaj efektive tie troviĝas. Tio aspektas preskaŭ kiel tuta telero plena de kraĵoj, kiuj rampas unuj sur kaj inter la aliaj kaj estas tiel manĝegemaj, ke ili deŝiras unuj al la aliaj la manojn kaj piedojn, angulojn kaj rondojn, kaj malgraŭ tio ili estas siamaniere gajaj kaj viglaj.

Nu, estis iam homo, kiun ĉiuj nomis Juko-Piko, tiel li estis nomata. Li ĉiam volis el ĉio havi la plej bonan, kaj se li ne povis tion havi simple, li prenis ĝin per sorĉado.

Jen li sidas unu tagon kaj tenas sian grandigan vitron antaŭ la okulo kaj rigardas akvoguton, kiun li prenis el strata marĉeto. Ha, kia baraktado tie estis! Ĉiuj miloj da infuzorioj baraktadis, saltadis, ĉirkaŭŝiradis kaj manĝadis unu la alian.

"Sed tio estas ja tute abomeninda!" ekkriis la maljuna Juko-Piko; "ĉu oni ne povas admoni ilin, ke ili vivu inter si en paco kaj trankvileco, kaj aranĝi, ke neniu el ili miksu sin en la aferojn de la aliaj!" Li pensis kaj pensis, sed li ne trovis rimedon, kaj tial li devis sorĉi. "Mi devas doni al ili koloron, por ke ili fariĝu rekoneblaj!" li diris, kaj li enverŝetis tre malgrandan guton da ruĝvinsimila fluidaĵo en la akvoguton, sed tio estis plej bonspeca sango de sorĉistino. Tiam ĉiuj tiuj strangaj bestetoj en sia tuta korpo fariĝis rozkololraj; la guto ricevis la aspekton de tuta urbo, sur kies stratoj svarmis nudaj sovaĝaj homoj.

"Kion vi tie havas?" demandis alia maljuna sorĉisto, kiu ne havis nomon, en kio ĝuste konsistis lia bonto-

neco.

"Se vi povos diveni, kio tio estas," respondis Juko-Piko, "tiam mi ĝin donacos al vi; sed oni ne povas tion facile diveni, se oni tion ne scias!"

La sorĉisto, kiu ne havis nomon ekrigardis tra la grandiga vitro. Tio aspektis efektive kiel granda urbo, en kiu ĉiuj homoj kuradis sen vestoj. Estis terure, sed ankoraŭ pli terure estis vidi, kiel unu puŝas kaj frapas la alian, kiel ili reciproke sin pinĉas kaj tiras, mordas kaj ŝiras. Kio estis malsupre, flugis supren, kio estis supre, falis malsupren. "vidu, vidu! Lia kruro estas pli longa ol mia! Ba! Ĝin for!" Jen estas unu, kiu havas malgrandan elkreskaĵon malantaŭ la orelo, malgrandan senkulpan elkreskaĵon, sed ĝi doloras lin, kaj tial ĝi plu ne doloru. Kaj li ekhakis lin kaj ŝiris lin kaj formanĝis lin pro la malgranda elkreskaĵo. Jen unu sidis silente kiel juna knabino kaj deziris nur, ke oni lasu lin en trankvilo kaj paco. Sed la juna knabino nepre devis eliri, kaj ili tiris ŝin kaj disŝiris ŝin kaj formanĝis ŝin.

"Tio estas tre amuza!" diris la sorĉisto.

"Jes, sed kio tio estas laŭ via opinio?" demandis Juko-Piko. "Ĉu vi povas tion diveni?"

"Tion oni vidas ja klare!" diris la alia. "Tio estas Kopenhago aŭ ia alia granda urbo, ili ja ĉiuj estas egalaj unu al la alia. Granda urbo tio estas!"

"Tio estas akvo el strata marĉeto!" diris Juko-Piko.

H.C. Andersen
Tradukis: L.L. Zamenhof

Herzberg, la Esperanto-urbo

Unika evento okazis por la Esperantomovado: la urba konsilantaro de Herzberg (Ĉiuj deputitoj de la 4 kvar partioj kun 3 sindetenoj) voĉdonis la 11-an de julio: la nova oficiala nomo de la urbo fariĝas: Herzberg am Harz, die Esperanto-Stadt/la Esperanto-urbo!

La urbo en ĉiu kampo fiere subtenas kaj laŭ sia kapablo antaŭenigas la uzadon de Esperanto por neŭtrala internacia interkompreniĝo, kaj planas uzi la lingvon por montri al la mondo siajn homajn, turistikajn, ktp. valorojn.

Kion la urbo jam faris kaj daŭre faras por kaj en Esperanto? (1) E-lingvaj urbaj vojmontriloj montras al la Esperanto-Centro; (2) la oficiala leterpapiro de la urbo surhavas la novan nomon: Herzberg - la Esperanto-urbo; (3) E-o estas uzata por la ĝemelurbaj kontaktoj; (Herzberg kaj Gora en Pollando) kadre de modelprojekto paralele ofertas E-on por siaj civitanoj kaj helpas la disvastigon de la lingvo por interkomunikado; (4) E-arkivejo funkcias en la malnova urbodomo; (5) partempa dungito de la urbo zorgas pri E-rilataj aferoj (kunorganizas programojn, disdonas E-afiŝojn, alvokojn por programoj, ktp.); (6) la urbo provizas (senpage aŭ ege favorpreze) ejojn por E-kursoj, konferencoj, kunsidoj, renkontiĝoj, koncertoj, ktp; (7) en ĉiuj lernejoj de la urbo estas E-instruado (en la lernejaroj 2005/2006 ĉ. 100 gelernantoj).

Kie kaj kiel Esperanto ĉeestas en la Esperanto-urbo? (1) Esperanto-Gesellschaft Südharz aktivis jam de 30 jaroj, kunligas E-istojn de la urbo kaj regiono; (2) Interkultura Centro Herzberg/Germana Esperanto-Centro ofertas tutjaran programon kun lingvokursoj en ĉiuj niveloj, seminariojn, konferencojn; kaj kiel klerigejo de GEA klerigas kaj pluklerigas E-instruantojn, instruistojn; (3) Esperantobiblioteko, video- kaj gazetarkivo estas tutjare vizitebla, praktike uzbla por studado, esplorado, ktp; (4) ekzamenejo por Germana Esperanto-Instituto kun du rajtigataj ekzamenantoj, porokaza oferto de UEA/ILEI-ekzamenoj; (5) Interkulturaj vesperoj por neesperantista publiko.

La Esperantisto de la Jaro 2006

Sendependa internacia magazino "La Ondo de Esperanto" iniciatis en 1998 ĉiujaran proklamon de la Esperantisto de la Jaro. Al la projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Kep Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. Poste laŭreatiĝis Osmo Buller (2001), Michel Duc Goninaz (2002), Dafydd ap Fergus (2003), Helmar Frank (2004), Povilas Jegorovas (2005).

Ĉi-jare estis proponitaj 21 personoj, al kiuj la elektantoj povis doni siajn voĉojn.

Sveda esperantisto Bertilo Wennergren, loĝanta nun en Koreio, estas proklamita kiel la Esperantisto de la Jaro 2006 pro la "Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko" (PMEG).

Intervjuo kun Bertilo Wennergren aperis en la januara kajero de "La Ondo de Esperanto".

Pliajn informojn pri la projekto kaj intervjuojn kun ĉiuj antaŭaj laŭreatoj legu rete ĉe: www.esperanto.org/Ondo/Ind-jaro.htm

Halina Gorecka

Pola Radio iras al interreto

Lunde la 8-an de januaro estis dissendita la lasta ordinara elsendo de Pola Radio en Esperanto. Jam la 9-an de januaro estis aŭdebla la unua novformata, podkasta elsendo. Laŭ informoj diskonigitaj en la lasta ordinara elsendo, ankaŭ la podkastaj programoj estos dissendataj ĉiutage. La unua podkasta elsendo estis 20-minuta, kaj laŭ la strukturo similis la antaŭajn elsendojn. Lige kun la lanĉo de la novformataj elsendoj estis malfermita ankaŭ nova esperantlingva retejo de Pola Radio. En la nova retejo mankas la riĉa arkiva materialo, kiu legeblis en la malnova adreso, kaj ĝenerale la nova retejo ne aspektas tute preta.

La unua novformata podkasta elsendo de Pola Radio en Esperanto komenciĝis kiel kutime, per polaj novaĵoj. La elsendon ĉefe prizorgis Gabi Kosiarska, sed partoprenis

ankaŭ Barbara Pietrzak. Post la trarigardo de polaj novaĵoj oni povis aŭdi la tradician mardan programon - trarigardon de Esperanto-gazetaro. Gabi Kosiarska en la unua podkasta elsendo informis, ke la esperantlingvaj elsendoj daŭre estos aŭskulteblaj ankaŭ per la retejo WRN.

La plej oportuna maniero aŭskulti la novajn elsendojn ajnakaze estas la podkasta variaĵo en la adreso <http://www.polskieradio.pl/podcast/39/podcast.xml>.

Podkasto estas relative nova maniero dissendi radiajn programojn tra la reto. Uzantoj abonas podkastojn per aparta programo, kiu aŭtomate serĉas novajn eldonojn de la elsendoj, kaj laŭdezire povas ankaŭ aŭtomate elŝuti ilin el la reto, tiel ke novaj programoj senprokraste estos aŭskulteblaj en la komputilo aŭ transmeteblaj al porteblaj son-reproduktiloj, ofte nomataj mp3-ludiloj.

Popularaj programoj por aŭskulti podkastojn estas ekzemple Doppler (por Windows) kaj iTunes (por Macintosh kaj Windows). Por aŭskulti la podkaston necesas unue instali unu el tiuj programoj en sia komputilo, kaj poste tra la programo abonati la elsendon. Post tio novaj eldonoj de la elsendo aŭtomate aperos en la komputilo, kiam ili estos haveblaj.

La enhavo de la elsendoj de Pola Radio en Esperanto ŝajne ne ŝanĝiĝos draste, kvankam la nova Esperantoredakcio konsistas el nur unu dungito, Gabi Kosiarska.

- Kvankam nia programo nun funkcias en la nova strukturo de Pola Radio, nome la direkcio de novaj amaskomunikiloj, kaj ne plu kadre de la poreksterlanda programo de Pola Radio, ĝia tasko restas senŝanĝa: informi vastskale esperantistan aŭskultantaron en la mondo pri Pollando kaj pri ĝiaj aferoj. Nia nova elsendo, kvankam premiere pretigata por la 17-a horo laŭ la mezeŭropa tempo, kiel ĝis nun, ekde hodiaŭ estas iom malpli longa, kaj daŭros ĉiutage nur dudek minutojn. Ni decidis tamen ne ŝanĝi ĝian teman kadron, diris Gabi Kosiarska en la unua novformata elsendo.

La retejo de Pola Radio en Esperanto reaperis, kun nova formo kaj nova adreso. La adreso de la nova esperantlingva retejo de Pola Radio estas www.polskieradio.pl/eo.

www.liberafolio.org

KALENDARO 2007

Ekde 11 februaro **Vigla vintro en Esperanto-Domo**. Tri semajnoj familiaj ek de 2007-02-11. Skiadu arbare kaj deklive (lifto 90 metrojn alta), sketu sur lagoj aŭ skulptu neĝon en nia arta konkurso. Senpaga semajno por via familio se vi pretas iom instrui skandinavojn pri Esperanto. Ni havas ankaŭ kelkajn skiojn kaj aliajn vintraĵojn por pruntedoni.

19-25. februaro **Semajno de Internacia Amikeco**

4-9. marto **Printempo de veteranoj**. Esperanto-Domo. La renkontiĝo pli maljunajn esperantistojn, eble ne plu aktivajn, kies movadaj memoroj kaj spertoj estas dokumentigindaj. Venu al agrabla rakontado, registrita de popolaltrneĵanoj, dum neĝo degelas kaj arbare amorfrenzas uragaloj.

12 - 19. majo **59-a Kongreso de Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio (IFEFF)** en Parizo. Inf: AFCE/UAICF 59-a IFEFF-Kongreso, 9 rue du Château-Landon, FR-72010 Paris, Francio. Tel.: +33(0)1 48 53 05 52, rete: sylviane.lafargue@sncf.fr

24-30 junio **Someraj kursoj** en Esperanto-Domo. Malnovaj amikoj kaj novaj studos diversnivele, infanoj kiuj ĉiujare venas lernos kaj ludos, helajn vesperojn plenigos muziko kaj danco kaj ni iun tagon ekskursos al vidindaĵo kaj banstrando. Krom la kutimaj lingvaj kursoj, ni organizos en 2007 esperantologian seminarion. Ricevu rabaton se vi venas kun infano(j). Ankaŭ tendumi eblos. www.e-g.se
14 - 22. julio **43-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-43)** en nordlitovia urbo Siauliai. Inf.: Litova Esperanto-Asocio, rete: litova.ea@mail.lt

21 - 26. julio **BEF-4 (Balta Esperanto-Forumo)** en Kaliningrado (Ruslando). Inf: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando, Tel.: +7-4012-656033 Rete: sezonoj@gazinter.net aux sezonoj@yandex.ru

21 - 28. julio **18-a Ekumena Esperanto-Kongreso 2007**, 60-a kongreso de IKUE, kaj 57-a kongreso de KELI en Pelplin, Pollando. Inf: Eichkorn, Bernhard aŭ Kozyra, Eduard, PL-83-130 Pelplin, Strzelnica 8 esperanto@powiat.malbork.pl aŭ Jadwiga Wasiuk

23-27. julio **Esperanto-kursoj** (elementa kaj por progresantoj) en la Popola Instituto de Valamo, Heinävesi, Finnlando. Ebleco kunvojaĝi ŝipe al festivalo Arta Lumo. Inf.: Esperanto-Asocio de Finnlando, sekretario Tiina Oittinen, Puutarhakatu 26 A 11, FI-20100 Turku, Finnlando tel. +358-2-2305319, eafsekretario@esperanto.fi

27. julio - 1. aŭgusto **Festivalo Arta Lumo**, Kuopio, Finnlando. Multflanka kultura aranĝo kun bonaj muzikistoj, verkistoj kaj aliaj artistoj en ĉarma ĉelaga urbo. Antaŭekskurso al la monaĥejo Valamo de kie ŝipvojaĝo al Kuopio. Inf.: Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando, ArtaLumo@esperanto.fi

28. julio - 3. aŭgusto **Internacia Junulara Kongreso** en Hanoi, Vjetnamo

1 - 8. aŭgusto **Internacia Junulara Semajno**, IJS en Hungario. Inf: Hungara Esperanto-Junularo, Pf. 87. HU-1675 Budapest, Hungario. ijs@ijs.hu

4 - 11. aŭgusto **92-a Universala Kongreso de Esperanto** en Jokohamo, Japanio. Inf: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel: +3110-4361044, fakso: +3110-4361751. Rete: uea@inter.nl.net
11 - 19. aŭgusto 40-a **Konferenco de ILEI** en urbo Ranzan, Japanio. Inf: ILEI.ru

www.eventoj.hu kaj aliaj

Italo verkas pri Svedio.

Daurigo de paĝo 8.

bildo prezentas impreson de la norda somero, kies lumo ofte estas tre frapa trajto por okazaj vizitantoj.

La "aliaj rakontoj" estas pli novelecaj ol la "bildoj", kaj ili plenigas preskaŭ du trionojn de la volumo. Sed ili estas de tre variaj specoj. Jen aperas fabeleto "Cikadino raĉenica", jen turisma raporto "Bulgaroj en Venecio", jen satiroj pri la moderna socio "Sagao de la fampiridoj" kaj "Belfagor". Tre bonaj estas kelkaj supozeble membiografiaj rakontoj el infanaĝo, precipe "Geedziĝo kun pafo", kiu eble estas la majstraĵo de ĉi tiu libro. Ankaŭ tre plaĉas al mi "La papera fuliko", leterforma babilajo pri memoroj, ĉiutago kaj magio. Ankaŭ "La du kredoj" pri la roloj de komunismo kaj katolikismo en norditala vilaĝo estas bona, kvankam kun iom stumpa fino.

En du noveloj cetere tre bonaj oni sentas iom tro forte laŭ mia gusto la propagandan celon: "Nobla sporto" (kontraŭ sporta pafado de kolomboj) kaj "Konflikto inter viando kaj spinaĵoj" (por vegetarismo). La dua tamen estas tre ĉarma rakonto el infanaĝo. Inter ĉio alia oni eĉ trovas stultajn sen valoro, "Fuĝanta kadavro".

Do, la volumo estas miksaĵo el tre diversspecaj tekstoj, kaj kvankam mi kutime ŝatas kontrastojn, mi eble ĉikaze preferus iom da redaktado kaj sarkado fare de la aŭtoro aŭ eldonejo. Tamen, oni facile trovas plurajn erojn vere valorajn, kiuj per unu movo levas Sen Rodin inter la gravajn novelistojn en Esperanto.

Ŝajnas ke la eroj estas verkitaj je tre malsamaj tempoj, ekde la 1950-aj jaroj ĝis la 1980-aj aŭ eble eĉ pli malfrue. La aŭtoro tamen redaktis la malnovajn tekstojn, kio videblas je komparo kun la eroj aperintaj en revuoj en 1959-60.

Estas evidente, ke Sen Rodin havas verkan talenton en pluraj prozaj ĝenroj. Lia stilo estas ĝenerale tre plaĉa, flua, eĉ eleganta. La lingvaĵo estas plejparte normala Esperanto, sen ekstravagancoj aŭ eksperimentoj. Tamen ŝajnas, ke li - eble kun la paso de jaroj - ekuzis nenormajn vortoformojn en kelkaj okazoj. Mi tute ne komprenas, kial la eldonejo ne korektis kaj normigis tiujn. Tra la tuta volumo li uzas "boli" en la senco de boligi, "jus" en la senco de tuj aŭ ĝuste, "ricevi" en la senco de akcepti, "gardi" en la senco de konservi, "akurate" en la senco de zorge kaj "vesti" en la senco de porti, surhavi. En Norda Prismo de 1959 li skribis tute bone "Ili estas peze vestitaj per pelto". Tion li nun malkorektis al "Ili vestas pezajn jakojn kaj felbiretegojn" (p. 90).

Krome, en la lasta parto de la libro eksvarmas pliaj misaĵoj. Kelkaj povus esti italismoj: "drago" (=drako, p.

265), "pompi" (=pumpi, p. 274), "merkuro" (=hidrargo, p. 339) kaj "same" (=tamen, p. 339). Aliaj verŝajne ne klarigeblas tiel: "matraĉo" (p. 239, 245), "espioni" (p. 260), "marĵuano" (p. 274), "denonci" (p. 277, 350), "propriulo" (p. 278), "femoro" (p. 281), "pledo" (=plado aŭ ev. plecto, p. 288) kaj "noto" (=tono, p. 352).

Se konsideri la amplekson de la verko, tiu listo ne estas timiga. Tamen mi emus serioze plendi pri ĝi - ne kontraŭ la aŭtoro, sed kontraŭ la eldonejo. La stilo kaj rakonta arto de Sen Rodin estas tiel plaĉa, ke vere valorus la penon elsarki tiajn tute superfluaĵojn makuletojn.

Fine restas al mi nur la agrabla tasko rekomendi ĉi tiun verkon, se ne en ĝia kompleteco, tamen en multaj vere legindaj eroj.

Sten Johansson

TRA LA MONDO

Universitataj kursoj en Kalifornio

La Universitato de Kalifornio en San Diego anoncas la starigon de oficiale aprobitaj kursoj pri Esperanto. Tiuj kursoj okazos somere kaj estos malfermitaj al la tutmonda esperantistaro.

La Universitato de Kalifornio en San Diego, ankaŭ konata laŭ la angla lingva siglo UCSD (www.ucsd.edu), estas unu el la plej konataj kaj prestiĝaj universitatoj en Usono, kaj inter ĝiaj profesoroj troviĝas ok Nobel-premiitoj. Ĝi situas apud la pacifika marbordo en suda Kalifornio, proksime de la landlimo inter Usono kaj Meksiko.


La kursaro daurigos la tradicion de la Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK), okazinta dum 30 jaroj en San Francisco kaj dum la lastaj jaroj en Vermonto. Honore al tiu tradicio, la nova kursaro en San Diego ĉi-somere pritraktos interalie la verkaron de la lastatempe forpasinta aŭtoro William Auld, la unua instruisto en NASK en San Francisco.

La kursaro okazos ĉi-jare inter la 9a kaj la 27a de julio. Por informoj pri registriĝo, stipendioj, ktp: Ellen Eddy eddyellen@aol.com

Oni bonvenigas ĉiujn interesiĝantojn al siaj someraj kursoj, sendepende de antaŭa universitata studo.

Humphrey Tonkin

Italo verkas pri Svedio



Bildoj pri norda lando kaj aliaj rakontoj. Sen Rodin. FEL. Antverpeno. 2006. 359 paĝoj.

Sen Rodin (vera nomo Filippo Franceschi) estas italo, naskita en 1932, kiu junaĝe – do frue en la 1950-aj jaroj – pasigis iom da tempo en norda Svedio kiel fabrika kaj ĝardenista laboristo. Li poste komencis verki en Esperanto pri siaj spertoj dum tiu kaj aliaj partoj de sia vivo. Supozeble li debutis en junio 1959 en Norda Prismo per kvin mallongaj "Bildoj el Norda Svedujo". En 1960 aperis du aliaj, pli ampleksaj tekstoj en La nica literatura revuo, kaj samjare aperis en Norda Prismo novelo el itala medio, "Nobla sporto". Ankaŭ en aliaj revuoj iam aperis liaj tekstoj. En 1963 li ricevis unuan premion en la Belartaj Konkursoj pro la novelo "Unua morto" kaj honoran mencion pro "Striko", ambaŭ el itala vilaĝo aŭ urbeto.

Longe poste Sen Rodin redaktis la menciitajn kaj multajn aliajn rakontetojn kaj novelojn por eldoni ĉe Stafeto, sed la morto de Juan Régulo Perez en 1993 nuligis tiun planon. Nur en 2006 ili finfine aperis ĉe Flandra Esperanto-Ligo. Temas pri entute 32 "bildoj pri norda lando" kaj 19 noveloj plejparte el italaj medioj. Entute la tekstoj ampleksas preskaŭ 350 paĝojn, do nekutime granda novelaro.

La aŭtoro mem ŝajnas preferi iom da mistika vualo ĉirkaŭ sia persono. Krom la jam menciitaj faktoj pri Rodin/Franceschi oni tamen povas trovi en Ordeno de verda plumo de Josip Pleadin, ke li en 1958 edziĝis al bulgarino, havas du gefilojn denaske Esperantlingvaj kaj de 1982 retiriĝis en ermitejon en norda Italio.

La prozaĵoj el norda Svedio ne senkaŭze estas nomataj "bildoj". Ili

plejparte peras ĝuste impreson, senton, etoson, kiujn la aŭtoro prezentas per rakonta maniero skiza, leĝera, ofte delikata. Preskaŭ ĉiuj okazas en vintro, kaj oni tre intense sentas la mallumon, froston kaj silenton, kiuj kvazaŭ haltigas ĉiujn moviĝojn kaj tenas la homojn en firma kaj fiksa preno. En multaj el la eroj ne tre gravas la agado, nek la homoj aŭ iliaj interrilatoj. Gravas ĉefe la etoso, kaj ĝi estas bonege kaptita de la aŭtoro.

La ĉefa rakonto-fadeno, kiu kunligas la 32 bildojn, estas jena: juna italo Vito vojaĝas al Svedio, renkontas junan svedinon Kerstin, enamigas, venas al ŝia hejma urbeto en la nordo, trovas laborojn en seĝejo kaj paperfabriko, restas dum tuta vintro, eble eĉ pli longe, sed fine reiras sola al Italio.

Tiu framo tamen restas relative malgrava. Oni malmulte ekkonas Vito, kaj eĉ malpli lian Kerstin. Ili amo apenaŭ sentiĝas. Kion oni spertas, legante ĉi tiujn bildojn, estas la sentoj kaj miro de Vito kiam li renkontas tiun foran landon kaj restas tie dum monatoj. Fakte jen kaj jen kelkaj aliaj personoj, flankaj figuroj, estas pli detale prezentataj ol la du geamantoj. Kaj estas frapa trajto, ke multaj el tiuj homoj ŝajnas sufiĉe malsimpatiaj, kvankam trafas kaj detale portretitaj. La samo cetere validas en pluraj el la rakontoj el itala medio.

Je la naŭa oni enlitiĝis en la geedza litosofo aperinta de murŝranko en la restadejo. Sinjoro Gust eklegis sportan gazeton, sed sinjorino Gust ne iluziĝas, ŝi ja bone scias, kio okazos ĉi-vespere. Tiom bone ke, kiam sinjoro Gust demetas la folion kaj senpere manipulas ŝian maldekstran mamon, ŝi kontentiĝas flustri: "Mallaŭte, mi petas, la studentinoj aŭdas..." (p. 88-89)

Ŝi rakontis, ke dum la infanaĝo ŝi multe ŝatis la pupojn, ĉefe se tualetitaj kiel svisaj montaraninoj, kun blondaj harplektaĵoj. Sed ŝi neniam povis realigi sian revon posedi unu el ili. Parolante ŝi animiĝis, la pala vizaĝo dronis en ridetojn, la lipoj retiriĝis kvazaŭ ion suĉante. Paŭlo responde ridetis pro ĝentilo. Li miris pro ŝia transformiĝo. Ŝi intencas ludi la rolon de altburĝa fraŭlino sed ne sukcesas, li pensis. (p. 214)

Inter la nordaj bildoj kelkaj aparte plaĉas al mi. Unu estas "Nokta glitveturado". Sur ĝiaj kvin paĝoj okazas nur tio, ke Vito skut-sledas laŭ dezerta ŝoseo en malluma vespero, dek du kilometrojn al iu vilaĝo kaj poste reen. Sed la aŭtoro tiel sukcese peras al ni tiun situacion, ke ni legante trovas

nin surloke kun li sur la sledeto, inter plugitaj neĝamasoj kaj nigre siluetaj piceoj.

Jam noktis. Forlasinte la vilaĝon li vidis antaŭ si nur densan grizaĵon en kiun li dronis, kaj super ĝi premege nigrigis en kiu sendistinge fandiĝis arboj kaj ĉielo.

Vito glitkuras puŝante la sledeton preskaŭ rabie jen per la dekstra jen per la maldekstra piedo sur la iom pli mola glacio kiu bremsas ĝin. De temp' al tempo li turniĝas pro la sensaĵo pri anhela ĉeesto lin sekvanta. Sed la plumba malhelo estas same nepenetrebla ĉiudirekte. Du-tri fojojn li senaverte elvojiĝas de la centra raŭto kaj kolizias kontraŭ flanka neĝomuro; tiam li forprenas la torĉeton por kontroli la direkton de la ŝoseo. Sed baldaŭ li rezignas pri tiu rimedo, ĉar la pilo estas preskaŭ elĉerpita, kaj cetero, post la momenta ekbrilo, li iĝas eĉ pli blinda ol antaŭe. La koro forte ekbatas, sed li firme decidas ne plu halti. Ekdoloras la lieno, la spirado fariĝas spasma. Mi ne devas cedi al la paniko, li pensas, sed la angoro minacas lin. Se almenaŭ alvenus aŭto! (p. 85-86)

Kiel svedo, legante la impresojn de italo pri norda Svedio, mi kompreneble notas detalojn miskomprenitajn aŭ mismemoritajn. Estas iom amuze retrovi niajn Kristnaskajn koboldojn kiel "nanej kun longa kapuĉo" (p. 53). Oni trovas adventajn stelojn en februaro, pagas per centimoj, aŭdas blekon de fuliko en nordisveda arbara lago kaj retrovas poemon de Nils Ferlin kiel "malnovan nordan amkan-ton" de laponoj (p. 132). Pluraj nomoj estas neeblaj, eĉ unu viro portas la vironan nomon Gun. Kompreneble tiaj aferoj tute ne gravas, ĉar la ĝenerala impresio, la sentoj de Vito fronte al la fremda medio, tute konvinkas. Cetero, por sveda leganto estas tre interese sperti, kion Vito unue rimarkas kaj kio precipe mirigas lin.

De post lia alveno norden du aspektoj logis lian atenton: la ĉieestantaj duetaĝaj dometoj el ligno plaĉe farbitaj paŝtelnuance, kaj la kompleta manko de fenestroŭtroj. Vespere ĉiuj fasadoj elmontris vicojn da lumaj kadroj pendantaj enaere, interne garnitaj per blankaj kurtenetoj; nenie oni povis malkovri fenestron blindigita per opaka materialo. [...] Kiamaniere tie ĉi oni defendas sin de frakasistoj ŝtelistoj murdistoj? Ĉu oni tiom fidus unu la aliajn? (p. 24).

Mi iom bedaŭras ke neniu el la 32 *Daŭrigo en paĝo 7.*